2.ª JARO N.º 6 DUONMONATA ESPERANTO-GAZETO 15 JANUARO 1937

# PoPola Fronto

INFORMA BULTENO INTERNACIA PRI HISPANA LUKTO KONTRAŬ LA FAŜISMO

ELDONO DE GRUPO LABORISTA ESPERANTISTA
REDAKCIO K ADMINISTRACIO: STRATO MAR, NUM. 25 VALENCIA (Hispanio)

## Pirata eskadro kaperas

Unu el la ĉefaj maŝoj pri kiu oni karese kalkulis, dum konspiro, por teksi la reton kun fortaj ŝnuroj, por nodi, je manoj k piedoj, la hispanajn civitanojn, estis certe la nacia eskadro. Tamen, la eskadro ne estas nur kolekto da ŝipoj aŭ submarenoj nek rondo da frivolaj amindumaj oficiroj. La eskadro konsistas ja ankaŭ el simplaj maristoj k hejtistoj pri kiuj, komprenebla, tute ne kalkulis nek atentis la bando da «patriotaj» admiraloj aŭ la trusto de iliaj fremdaj aĉetintoj. Antaŭ strangaj suspektindaj ordonoj, dum daŭro de la historia nokto de 18. Julio, la amasa eskadranaro, sur kies ĉapoj ne petolas ora pasamento, obeis nur la vokon de sia intuicio ĵetinte en la maron la korpojn de ĉiuj elegantaj estroj, kiuj intencis abomene efektivigi sur ferdeko perfidon al sia patrio eĉ kun la helpo de tiu honesta popola parto, kiu plenumas sian soldatan servon en flosanta kazerno.

La ŝipoj k submarenoj de la eskadro, post epopeaj epizodoj, restis fidelaj al popolo, je la dispono de la legitima registaro. Nur en unu ŝipo estis venkita la maristaro! en «Almiralo Cervera» kiu kun du novaj ŝipoj ĵuŝe finkonstruitaj k tial ankoraŭ hazarde kuŝantaj sur akvo de havenoj kie la ribelo sukcesis, formis ĉe la komenco la bazon de la faŝista pirata eskadro, kiu transportinte maŭrojn, el la plej sovaĝaj triboj de Maroko, por la konkero k invado de Hispanio, plenumis la unuajn planojn por defendo de la «tradicio». Kiam fondiĝis la nova registaro, estis grava zorgo, por la ministro de Maro k Aero, konvena kreado de gvidaj postenoj en la militŝiparo, por anstataŭigi la vakajn lokojn de vantaj superuloj per freŝa oficistaro el popola deveno, kun sufiĉa tekniko. Ĝis tiam, bedaŭrinde, ne povis nia eskadro tiel atente deĵori, laŭ la periferio de nia lando, por efika protekto de havenoj kun gravegaj taskoj por trafa disvolviĝo nun de la militaj operacioj.

Dume la faŝistaj ŝipoj, de tempo al tempo, eliris de siaj kaŝejoj k surprize atakis, sen difinita celo, per pafoj de siaj kanonoj, urbojn k vilaĝetojn kun situo apud la maro. Sed finfine nudiĝis malĉaste la tragedio. Germanio k Italio ŝiris vualojn k agnoskis la ribelintojn. La pirata faŝista eskadro, kun helpo jam de fremda ŝiparo, vigle ekfunkciis; ĝi traserĉas boatojn, kaptas k detruas komercajn ŝipojn de eŭropaj nacioj, reviviginte, en la muĝanta ampleksego de la blua maro latina, scenojn forgesitajn el romano pri korsaroj. Misteraj ŝipoj, kun arogo de bandito, promenaĉas trae de la tri maroj de Hispanio en kies ondoj ne jam plu valoras la internacia mara kodo sed la pirata leĝo de l' perforto. Nekonataj «sennaciecaj» submarenoj ĵetas torpedojn ien ajn, aŭ ili dronigas, kun personaro, ŝipojn kun leĝaj ŝtataj flagoj kiel tiu bela *Komsomol*, kiu vojaĝis fervore kun la ĝentila ŝarĝo de nutraĵoj k ludiloj de la soveta popolo por la hispanaj infanetoj...

Anglaj, svedaj k francaj ŝipoj ricevas konstante provokojn k ĝenojn de tiuj modernaj piratoj, kiuj skandale kaperas sen baro nek puno antaŭ la ŝtoniĝintaj okuloj de multaj nacioj kun fatala risko, pro pasiva observado, de aktiva suferado. La internacia faŝismo milite intervenas kontraŭ la sendependeco de Hispanio. La tiranoj, kiuj nun premas sufoke la dignajn popolojn de Germanio k Italio, kun rikanema taktiko, sendas siajn eskadrojn en akvojn de la Mediteraneo k, sen respekto por la glora legendo de tiu antikva maro de kulturo k civilizo, kraĉas provokojn sub eksterleĝa flago de korsaroj.

## PROPRA MEDIO

Nia entuziasma apliko de Esperanto, por universala informado pri la radikoj, intencoj k sekvoj de la militista ribelo en Hispanio, havis la ŝancon povi rompi la ŝelon de riĉa spirita juvelo, kies glataj facetoj, jam en libero, lumige disradias tre helajn reflektojn. Pura natura instinkto de l' homo! jen valora trezoro, kun ofte modesta k tamen tre ĉarma koverto, kvazaŭ perlo en la konko, kiu estas delikata kvalito en la granda amaso popola de nia esperantista mondeto, kiu ordinare vivas k laboras, anonime suferas k ĝuas.

Al tiu samideanaro, ĝermo de nova socio, ni turnis la voĉon; ni etendis la manojn, kun plena granita konvinko pri trafa direkto. Ni serĉis obstine, persiste, starigi kontakton kun la mola k virga medolo de nia aŭtenta unu sola popolo, kiu, havante nuancojn de ĉiuj nacioj, ne povis satigi siajn aspirojn per simpla korespondado aŭ per seka pago de jara kotizo en iu organizo kun personecaj kvereloj en triviala konkurenco kun aliaj...

Ĉiu popolo, ankaŭ ja la nia, por vibri k senti, bezonas, avidas, aŭdi k paroli pri aspektoj k demandoj de sia propra vivo, de sia propra medio. Sana popolo infane ĝojas, sen envio, antaŭ gaja sceno k suferas, kun premanta koro, kun eksplodo de ploro tre sankta, antaŭ doloro, antaŭ ĉagreno... k eĉ antaŭ perfido de fripono aŭ abomeno de fia kanajlo, ĝi sopiras, jes, sopiras! pri armo k subita puno kontraŭ la malbonulo.

Sur la grundo fekunda de tiu kampo ni fosas la sulkon, ni ĵetas la semojn pri vero k pravo k rajto. Aperos abunda k bela rikolto, pro nia laboro, kiu estos kareso k fiero por nia duobla kondiĉo de hispanoj k esperantistoj.

La internacia speciala popolo de la verda movado partoprenas, laŭ povo k eblo, en nia lukto kontraŭ la faŝismo. Nia juna gazeto, kun nomo simbola, en sia propra medio, portas duonmonate de mano al mano la unuigajn bantojn de fratecaj sentoj. Nia redakcio ricevas ĉiutage la pulson de l' mondo. Leteroj, poŝtkartoj, ĵurnaloj, salutoj, sugestoj, proponoj... Kion ja pli postuli oni povas por montri publike al ĉiuj filistroj, interne k ekstere de la esperantismo, ke dormantoj jam vekiĝis, ke honesta popolo ĉiam sindoneme respondas, se oni uzas ĝustajn terminojn de facila lingvo por rezonoj al ĝia cerbo k vokoj al ĝia koro?

Esperanto estas fakto en Hispanio dank' al nia decido mobilizi ĝin alarme, tra kontinentoj k landoj, en defendo de la universala popolo, fragmento el kiu ricevas nun ofendajn batojn en la ibera duoninsulo.

Nia lingvo vivas do jam definitive!

## Heroismo sen efika materialo estas fordono al la morto

**Moderna milito bezonas abunde taŭgan armilaron. Kruela malamiko, ekipita per plej perfektaj bataliloj, meritas adekvatan respondon. Ĉu vi scias, internacia leganto, ke multaj fortikaj brakoj ankoraŭ vane postulas armilojn? Ne forgesu do la vokon ĉar skeptika forgeso estus frue terura danĝero por vi mem!**

KOMENTARIOJ


# VENDITA PATRIO

Kiel ni antaŭvidis, jam oni bone konas la ekonomiajn kaŭzojn, kiuj plenforte instigis la germanajn faŝistojn al senhonta interveno en hispanajn aferojn. Sekreta informilo estas ĵus malkovrita, en kiu aperas detale la preparaj manovroj de germana faŝismo rilate al intensa industria ekspluatado de nialandaj riĉaĵoj.

Dum la unuaj monatoj de jaro 1935ª venis al Hispanio sciencaj gravuloj, kun speciala misio pri zorga esplorado de niaj subteraĵoj. Ili ĉiudirekten trakuris la landon k sendis, por analizo, specimenojn al germanaj laboratorioj.

Dum monato Aprilo de tiu sama jaro, anonima societo nomata *Metallgeselschaft* ellaboris planon por racia utiligo de hispanaj krudaĵoj k estis tuj kreata adekvata organizo konsistanta el jenaj societoj: la *Metallgeselschaft*, la grupo metala *Kloene*, la trusto *Rheinmetall*, la grupo *Siemens* k *Halske*, fabrikoj *Vulcan* k *Krupp* k societo *I. G. Farbenindustrie*. Poste tiu trusta organizo amike rilatiĝis kun alia simila starigita en Italio.

Laŭ tiu informilo, ili celas entrepreni sisteman ekspluatadon de multenombraj k diversspecaj minoj, ĉefe la jenaj: Minoj de fera mineralo en Riffo (Maroko) kies produktaĵoj estas jam nur sendataj al Germanio; minoj de asfalto k karbo en Valencia de Alcantara (provinco Caceres) kie oni supozas ankaŭ la ekziston de petrolo; minoj de lignito en Isabena (provinco Huesca)



kies utiligo estus treege interesa laŭ milita vidpunkto ĉar oni povus atingi per ĝia distilo specon de benzino por provizi germanajn k italajn militŝipojn; minoj de antimono en Riaño (Asturio) kiuj estas la plej riĉaj el la mondo; minoj de hematito en Villalba (provinco Pontevedra) kies produktkapablo estas ĉirkaŭ kvar milionoj da tunoj; minoj de stano en S. Lorenzo de Justaner (provinco Orense); minoj de grafito en provinco Toledo kiujn ĉefe deziras ekspluati la *I. G. Farbenindustrie* ĉar oni povas eltiri el ili lakojn, oleojn k farbojn; minoj de oksido de fero, kies pureco estas grandega, en S. Lorenzo de la Muga, k multaj aliaj kies listo estus tro longa.

Por efektivigo de tiu plano la germanaj firmoj sin turnis, pere de komandanto Stefano Beni k de konata faŝisto Giuratti, al Itala Federacio de Industrioj k al Mussolini mem. La koncernaj konversacioj plensukcese finiĝis je la komenco de l' jaro 1936, k ili pretiĝis gaje rikolti la frukton de sia laboro pro helpo al hispanaj faŝistoj, kies sukceso en proksimaj balotoj ili ne dubis tiam.

Sed ĉiuj kampanjoj per blufa propagando, intensa spionado k forta agitado plene malsukcesis k en Februaro pasintjare la venko, en politika batalo, venis al Popola Fronto en kies programo unu el la plej interesaj punktoj estis la nepra naciigo de l' minaj riĉaĵoj.

Sed internacia faŝismo ne cedis al neatendita momenta malvenko, kune kun perfidaj generaloj preparis zorge la venĝon, k kvin monatojn poste eksplodas ribelo, kiun ili antaŭvidis kiel tuj venkonta; denove ili eraris ĉar hispana popolo efike montris al la tuta mondo, ke sen organiza preparo; nek taŭgaj armiloj, ĝi kapablas deteni k repuŝi la kriman ribelon.

Kiam hispanaj faŝistoj eksentis fatale la gravan danĝeron de tuja pereo, denove sin turnis al germanaj faŝistoj k la 15. de Novembro, en Berlina Kancelario, okazis kunsido, kiun ĉeestis jenaj gravuloj: generalo Goering, generalo Fauvel; Rudolf Hes k Alfred Rosemberg, kiuj reprezentis germanan registaron: marista oficiro Agacino, ambasadoro Agramonte Cortijo, militisto Martinez k faŝisto Feipo de Sotomayor, reprezentante la hispanajn ribelintojn.

Hispanoj detalis pri la graveco de milita situacio, tute malfavora, k Goering deklaris, ke gemana registaro neniel toleros la eblan triumfon de popola fronto; sed tamen germana registaro bezonis garantiojn por faritaj konsentoj, pri industriaj planoj, en hispana teritorio k en hispanaj kolonioj. Goering aldonis, ke Germanio estas preta intense helpi ĝis atingo de venko, sub sekvantaj kondiĉoj: cedo de insuloj Canarias, de Maroko k de Guinea kolonio, krom la interkonsentita ekspluatado de minaj krudaĵoj.

Hispanoj avertis ke Italio jam estas petinta al ili la cedon de insuloj Baleares, kolonio Rio de Oro k rajton ekspluati karbajn k hidrargajn minojn en Hispanio. Ili aldonis ke malgraŭ ĉio, Franco estas preta ordigi amike la aferon por la bono de faŝista idealo.

Finfine ĉiuj alvenis en amikan interkonsenton k la 20. de Novembro germana k itala registaroj, publike rekonis la «registaron» de Burgos, ili intensigis la alsendon de «volontuloj» k armiloj por akceli la venkon de faŝista armeo.

Miloj k miloj da italoj k germanoj alvenis en nian landon, aeroplanoj k kanonoj estas senditaj amase; nun jam ne plu temas pri hispana milito sed pri germana-itala milito kontraŭ hispana popolo.

Germanaj k italaj faŝistoj ne rezignas pri siaj koloniigaj planoj, sed hispana popolo ne estas preta submetiĝi al tiaj krimuloj. Ni preferas pli la morton ol tian submetiĝon; ni ja batalos pli k pli arde por ke la faŝistaj ekonomiaj celoj plene fiasku; je la servo de tutmonda libero k demokratio.

**LAŬDO al Hispanaj Gebatalantoj.— En la Angla Parlamentejo, dum la diskuto pri armiloj por Hispanio, la Dukino de Athole, parlamentanino por Skota distrikto Kinross, diris: «Mi deziras laŭdi la kuraĝon de la viroj k virinoj, kiuj iris al la batalfronto, tro ofte sen taŭgaj bataliloj».**

# GUTO KONSTANTE FRAPANTE...

Estas nia POPOLA FRONTO, ĝusta konscio k forta instigo al agado por la hispana lukto.

Sen fremda intermikso, nia bulteno svinge laŭtigas la veron tra la esperantismo, sola provizejo el kie tre honore ricevas ĝi nutron k vivon por daŭre fluadi konstante frapante...

Ne ankoraŭ laciĝu, ne hezitu senĉesade monon kolektadi! Ĉiu monereto, kiun vi kaptas estas ja plia ornamo por la gazeto, plia paŝo antaŭen por nia, k via, entrepreno, nova hejmo kie resonas kanto pri espero k vivo, nova okulo ricevanta lumon, nova mano, kiu defende pretiĝas k certe, tre certe, nova bastiono, nova tranĉeo gajnita en la grava fronto de la opinio internacia.

Sendu akurate viajn donacojn laŭ jenaj financaj interna ciaj adresoj

| | |
|---|---|
| ĜENERALA INTERNACIA ADRESO | NEDERLANDA ADRESO |
| nur por mono | nur por mono de holandanoj |
| FARENC GUSTAVE | PETRO van der PLANK |
| 56, Rue du Parc | Van Speijkstraat, 48-I |
| ORLEANS (Loiret) FRANCIO | poŝtĝiro 245542 |
| | AMSTERDAM W. Nederlando |

REDAKCIA ADRESO POR ĈIO ALIA

POPOLA FRONTO—Mar, 25, Valencia (Hispanio)

# EMOCIA RENKONTIĜO

Vespere. Eknoktiĝas. En la batalfronto de Madrido, apud la tranĉeoj, deĵoras viglaj soldatoj de la popola armeo. Iliaj siluetoj elstaras meze de la mallumo densiĝanta. Super iliaj kapoj, la kanonoj de la malamiko, en respondo al nia artilerio, sendas siajn obusojn al la kvartaloj de la urbo, kie loĝas sendefendaj geinfanoj... En la vicoj de la lojaluloj oni pensas pri senkulpaj viktimoj, pri la familianoj eble mortigitaj de tiuj grenadoj.

Neatendite, el la kontraŭa tranĉeo eliĝas moviĝantaj estaĵoj, kiuj aŭdace ekstaras sur la parapeto. La deĵoranto, vidinte tion, alarmkrias al popolaj remparoj. — «Atentu! Ili venas...» — diras voĉo.

Preskaŭ samtempe, la oficiro kiu komandas tiun sektoron stariĝas apud tiu, kiu sciigis la novaĵon. Konfirminte ĝin, li siavice diras:—«Restu ĉiuj kvietel Neniu pafu ĝis mi ordonos.» —Tamen, oni aŭdas kiel niaj soldatoj pretigas la fusilojn k streĉe premas ilin kontraŭ la ŝultro.

Sintrenante sur la tero alproksimiĝas kelkaj «faŝistaj» soldatoj. La milicanoj restas kvietе, la fusiloj mute.

—«Senmove ankoraŭ!» — ordonas la oficiro, k per laŭta voĉo li krias:— «Kiu venas?».—Jen la tuja respondo:— «Ne pafu, kamaradoj, ni iras al vi!».

La oficiro, akompanate de du milicanoj, supersaltas la parapeton k apudiras al la alvenantoj. Je du paŝoj de la grupo la oficiro haltas. Liaj okuloj alnajlas soldaton k subite ĉiu el ambaŭ elparolas nomon. Ili kunfandiĝas en brakpremo. La sceno surprizas ĉiujn. Ili estas fratoj...

La kvin transkurintoj, el la ribelaj trupoj, vestis mizere k malsatis. Oni havigis al ĉiuj novajn komfortajn vestaĵojn. Ili ĝojis pro tia akcepto k raportis, ke estante en la armeo ĉe la ekribelo, ili estis devigataj resti k batali kontraŭ la registaranoj. Sempaciencie ili manĝis avide k eĉ trinkis brandon por festi la feliĉan renkontiĝon de la du fratoj.

Tiun ĉi fojon, la Destino volis pravigi, ke ĉi tiu estas interfrata milito.



EN LA «NACIISTA» HISPANIO

—Iru serĉi interpretiston. La kaptito nur parolas hispanlingve.

## Letero de Generalo Mangada

Al la Redakcio de POPOLA FRONTO.—Valencio.

Karaj kamaradoj!

Esperanto estas lingvo ĉies k propraĵo nenies. Esperanto estas lingvo por alproksimigi la korojn de l' homoj, kiel konstatas nia himno. tial mi ne povas kompreni, ke iu juĝu POPOLA FRONTO-n mallaŭdinda. POPOLA FRONTO mirinde plenumas postulojn de la «Interna ideo», postulojn de la granda spirito kreinta la lingvon; POPOLA FRONTO defendas la rajtojn de la homamanta hispana popolo kontraŭbatalante ĉiujn «obstinajn barojn», perforton, maljustecon, unuvorte: ĉion, kion nia himno kantas. POPOLA FRONTO uzas plenrajte la lingvon Zamenhofan por diskonigi la krimojn de l' Faŝismo en Hispanio, la krimojn, ne nur de la hispanaj faŝistoj sed ankaŭ de la portugalaj, germanaj k italaj faŝistoj en nia malfeliĉa lando.

Antaŭen! Sanon!

Julio Mangada Rosenörn

# Konversacio

Jen interesa konversacio inter anglo k hispano, kiun ni ne povas ne komuniki al niaj legantoj.

**A.**-Vi miras pro tio ke la brita opinio ne tre rapide evoluas favore al legitima registaro de via lando, sed vi devas kalkuli kun la propaganda faktoro; de antaŭ multe da tempo oni informis la anglan opinion malfavore al interesoj k aspiroj de la maldekstruloj de Hispanio. Nun ankoraŭ estas milionoj da angloj, kiuj blinde kredas, ke Franco k la aliaj ribelintoj estas la elito de la kavaliroj, patriotoj decidintaj liberigi la patrion de anarkio k starigi ordon, kiu garantios al ĉiu civitano liajn liberojn, vivon k legitimajn bienojn. Kiam mi venis, mi kredis ion similan, k ankoraŭ...

**H.**-Apliku al Anglio la elementojn de hispana problemo. Imagu ke liberal-laborista koalicio venkis konservativan partion post ĝenerala baloto k ke la reĝo nomis konsekvence ĉefan ministron al Lloyd George, Crispps aŭ Morrison, laŭ regulaj cirkonstoncoj. Imagu ankaŭ ke tiu koalicio, por la plenumo de honestaj promesoj, faritaj dum politika propagando, intencas rajtigi sian programon pri sociaj reformoj laŭ sistemo, kiu plej akordiĝu al angla tradicio. Fine, imagu ke konservativa partio, ne konsiderante sin kiel kiel venkiton k ne akceptante la gravan rolon de «opozicio», sin ĵetas en kaŝan konspiron.

**A.**-Mi tion ne povas imagi—respondas la anglo kun mirega rigardo—; la matematika neeblo, k ni ne menciu la metafizikan neeblon, ne povas esti konsiderata kiel realigebla supozo.

**H.**-Neeblo en Anglio, sed ne en Hispanio. Ankoraŭ pli, imagu ke konservativa partio, laŭ tiu konspira tasko, koruptas la armeajn institucioin k akiras aktivan kunhelpon de armeo, de milita maristaro k de enlanda polico, k en difinita tago ili ribeliĝas. Imagu ankaŭ ke angla popolo kiam ekscias pri tio, indigniĝas k sin pretigas al defendo de Konstitucio, de la reĝo k de legitima registaro; ke ĝi laŭpove sin provizas je armiloj; ke ĝi sieĝas la nestojn de la perfido en kazernoj k arsenaloj; k eĉ plie imagu ke la ribelintoj, ne fidante al venko, petas helpon al Hitler k promesas al li parton de angla kolonia imperio. Kun mara k aera germana helpo ili alportas el Hindio cipajajn regimentojn, kiuj elsipiĝas ĉe rivero Tamezo k atakas la urbojn de Anglio.

La anglo subite ekstaris; liaj okuloj brilis, liaj pugnoj minacis k per trema voĉo balbutis:

**A.**-Mi ne povas toleri eĉ hipoteze, ke vi diru tiajn monstraĵojn pri konservativuloj, militistoj k maristoj de Granda Britio. Ne estas unu — eĉ unu! — kiu kapablus realigi nek imagi tiel monstran perfidon.

**H.**-Nu, bone. Tio, kio ŝajnas al vi monstra perfido, kiam temas pri homoj k institucioj de via lando, estas kion faris k faras en Hispanio tiuj, kiujn ni prave nomas «perfiduloj». Tamen ili havas favoran gazetaron k eĉ multajn admirantojn en Britio.

**A.**- Vere — ŝanceliĝe diris la anglo—vi pentras la aferon tiele...

**H.**-Ne estas mi, kiu tiel pentras, sed la Vero...

Neniu evento, en la historio de la socialaj luktoj, produktis similan unuanimecon en la laborula mondo, kiel la monstra milito en Hispanio. Ĉiuj Internacioj de la laboristaro esprimis sin solidare kontraŭ la komuna malamiko. En Hispanio mem unuiĝis ĉiuj fortoj laboristaj, antaŭe ĝismorte malamikaj, por defendi sian komunan intereson: la ekziston.

Prave diris Largo Caballero, ke ni jam estas meze de eŭropa milito, ardanta jam sufiĉe rimarkeble. La amasa ekspedo de homa k milita materialo per la faŝistaj Italio k Germanio, la decidemo per kiu ili kontinuas sian entreprenon, spite la internaciaj konvencioj, la internaj malfacilaĵoj kreskantaj en tiuj landoj, puŝantaj ilin pli k pli sur la vojon de aventuro, ne lasas multe da espero, ke la hispana milito limiĝos en sia aktuala kadro. La sola rimedo eviti «por la momento» ĝeneralan militon, estus la cedo de libera vojo al la faŝistaj armeoj k rekoni la hegemonion al Germanio k Italio. Tio signifus plenan submetiĝon de la t. n. demokrataj ŝtatoj k de Sovetio, lasta remparo de modesta libero k homdigno, al la arbitra volo de la reprezentantoj de la maljusto k krimo sur la Tero, k tio same signifus libervolan likvidon de la laborista movado k liberan agnoskon de la regno faŝista. La devizo estus: «Prefere vivi kiel sklavo ol esti kadavro».

Tiu ĉi nuda stato de la faktoj k la honto antaŭ tia fino de la laborista movado, kondukis laboristajn gvidantojn, konataj ĝis nun kiel ĝisoste reformistaj, al decidaj, energiaj deklaroj. Sed jam la tempo pasis, kiam deklaroj unuanimaj povis efiki kiel minacoj. Tiom longe kiom la ĝisnuna helpo povis balanci la ekspedon de armiloj pere de la faŝistoj, oni povis esperi, ke la hispanaj kamaradoj venkos per la superpezo de la homa materialo k de l' entuziasmo. Sed nuntempe, kiam la faŝistoj jetas armeon post armeo sur la hispanan, sangoplenan teron, la laboristaj organizoj internaciaj troviĝas antaŭ multe pli grava problemo.

La problemo hodiaŭ ampleksiĝis tiel, ke sen la interveno de la t. n. demokrataj ŝtatoj, kies nombro k potenco estus sufiĉe granda por tuj rezonigi la atakantojn, la triumfo de la faŝistoj estas apenaŭ evitebla. Jam okaze de la abisena milito, ni povis vidi la abomenindan spektaklon, kiun oni ludis en la Ligo de Nacioj; komdamninte Italion kiel atakinton kontraŭ membro de la Ligo, kvindeko da nacioj ne estis kapabla haltigi la rikanantan rabiston k honte oni kovris per vualo tiun eksceson de kuraĝo.

Ni spertis, ke la konvencio pri Ne-Interveno transformiĝis en vera blokado kontraŭ la legitima registaro hispana, elektita antaŭ kelkaj monatoj per grandega plimulto de la popolo. En la momento de la ekribelo, la francaj konsuloj k ambasadoro en Hispanio, ne nur lasis la francan registaron en plena konfuzo k sen klaraj informoj pri la situacio, sed eĉ ili kondutis kvazaŭ la ribelantoj jam estus la aŭtentika registaro hispana.

# DECIDAJ HOROJ PO

«Ti... kratio k la... de Madrid... (El ...

Manenmane kun ili laboris la oficistaro de la Oficejo por Eksterlandaj Aferoj en Parizo, bastiono de la reakcio, neniel tuŝita de la popolfronta movado, profitante de la malsperto registara en la internacia politiko k trudante al ĝi sian politikon de «paco».

Tiu Oficejo por Eksterlandaj Aferoj en Parizo, estas la plej grava garantiaĵo en la manoj de la reakcio, pere de kiu ĝi esperas povi saboti la tutan socialan reformon internan. Ne havante kapablajn homojn, kiuj povus anstataŭi la funkciulojn en la oficejo, Blum ne riskis forigi tiujn reakciulojn des pli, ĉar ankaŭ inter la radikaluloj troviĝas multaj elementoj opoziciantaj al tia ŝanĝo. Tiel la registaro de la popolfronto estas plene liverata al ilia agado.

Konsiderante plue, ke ne alia spirito regas en la oficejoj de Britio k en tiuj de aliaj landoj t. n. demokrataj, oni facile trovas la eksplikon por ilia sinteno rilate al Hispanio. Tiu ĉi sinteno estas miopa, certe, sed la reakcia klaso, kiu sin trovas antaŭ la alternativo elekti la faŝismon aŭ la socialan revolución, preferas ligi sin al la unua, kiu almenaŭ ne tuŝas «principe» la kapitalistan ekspluatadon.

Tio ĉi estas evidenta, antaŭ ĉio, en la sinteno de Britio. Oni ne povas sufiĉe insisti pri la danĝero de la brita politiko, kiu konsistas en la taktiko dividi Europon en du kampojn k ekvilibrigi iliajn fortojn, tiel ke, okaze de armita konflikto, Britio povu pere de sia potenco doni la superpezon al tiu aŭ al alia grupo, konforme al la propra intereso. Britio, helpante al Mussolini starigi sian faŝistan ŝtaton, atingis tiel: 1) kontraŭpezon al la forte kreskinta potenco de Francio, k 2) forigon de la danĝero, ke en Italio instaliĝu socialista reĝimo kun fatalaj reflektoj en Francio.

Sed Britio helpis ankaŭ al la germana faŝismo, kontraktante kun ĝi konvencion pri militŝiparo k rifuzante intervenon okaze de la kontraktorompo de Hitler. Tiu ĉi agado de Britio estis la respondo al Francio, kies tiama ministro por eksterlandaj aferoj, Louis Barthou, havis la aŭdacon organizi la pacon per sistema kreado de aliancoj sen, ja eĉ kontraŭl, la britoj k metis la fundamenton por la sovet-franca alianco.

Tiu ĉi politiko de Britio kondukis ĉiam, k kondukas hodiaŭ same, al neevitebla «ĝenerala» milito, car ĝi implicas la tendencon de seninterrompa armado. Pri tio, oni konsciiĝas iom post iom ankaŭ en Britio k vidante, ke la politiko de la eŭropa ekvilibro ne plu estas tiel

## Kruela malamiko de la popola klaso studas, sur karno de Hispanio, la...

## La demokrata opinio de la tuta mondo de...

# ...A EŬROPA CIVILIZO

*...ale prezentiĝas en Hispanio, estas la batalo por la Libero, la Demo-... le Paco, estas la afero de nl ĉiuj, kiun defendas la heroaj batalantoj ... la mortiga atako de l' internacia faŝismo.»*

*... de la Sindikata Internacio k de la Socialista Internacio.)*

efika k sekura, Britio komencas plenumi vastan planon por la rearmado. Antaŭ ol tiu ĉi plano ne estas efektivigita, Britio volas eviti militon «je ĉiuj kostoj».

La embaraso de Britio donas favoregajn ŝancojn al la faŝistaj ŝtatoj por havigi al si, rabistmaniere, strategiajn avantaĝojn. Italio hodiaŭ komandas, de sur Etiopio, la markolon de la Ruĝa Maro, ĝi instaliĝas sur la Balearaj Insuloj k, kiu scias kiajn avantaĝojn ĝi povas ankoraŭ tiri el intima kunlaboro kun la hispanaj faŝistoj, okaze de definitiva venko. Germanio siavice havas aspirojn al la Kanariaj Insuloj, al la subteraj riĉaĵoj de la hispana tero k provas konkeri firman pozicion en la strategiaj punktoj de la portugala marbordo. Ambaŭ ŝtatoj povas procedi des pli aŭdace ju pli klare evidentiĝas la aktuala embaraso de Britio.

En ĉi tiu donita situacio, la laboristaj organizoj devas klare vidi: ke, escepte Sovetio k kelkaj aliaj malgrandaj potencoj, kiel Svedio, Norvegio k precipe Ĉekoslovakio, la gravaj potencoj ludas imperiistan ludon. Oni ne povas esperi, ke Britio siavice entreprenu larĝfrontan agadon por la kolektiva pacsekuro, kiun gi eĉ sabotas, kiel pruvas la Historio. La iniciativon devas ekpreni Francio k Sovetio, al kiuj rapide k decide aliĝus granda nombro da etaj ŝtatoj, vivantaj en angoro antaŭ la impetega ekspansiemo de Germanio k Italio.

Francio vivas hodiaŭ, malfeliĉe, en plena dependo de la Brita politiko. La kaŭzon de tio mi montris, indikante la reakcian neston en la Oficejo por Eksterlandaj Aferoj. Alia motivo estas la timo resti sola, okaze de armita konflikto. Sed se oni scias, sub kiaj cirkonstancoj naskiĝis tiu fama deklaro de Britio, ke okaze de milito eventuale eksplodanta pro la hispana afero, Britio ne povus helpi al Francio, tiam oni prave povas konkludi, ke efektive Britio ne havas alian vojon ol helpalkuri al Francio. Tio signifas do, ke Francio povas, kvankam singarde, fari politikon multe pli energian k memstaran, ĉiam argumentante, ke ĝia politiko celas nenion alian ol la kolektiva sekuro por paco.

Oni ne devas forgesi, ke en Anglio mem, tia politiko trovus multajn helpantojn, kiuj siavice do, devus fari fortan premon sur la agadon de la registaro. La konservativa registaro angla dankis sian elektovenkon nur al la promeso subteni la Ligon de Nacioj k kunlabori al la organizo de la paco. La fakto, ke ĝi pekas kontraŭ sia promeso, ne estas rifuto, sed nur kondamno, de la respondecaj elementoj, kiuj devus priatenti la politikon de la registaro k krii alarmon, kiam ĝi flankenĵetis la elektan maskon por kontinui la imperiistan politikon. Estas evidente, ke la laboristaj organizoj, sindikataj k politikaj, membroj de la Internacioj sin deklarintaj solidaraj kun la hispanaj kamaradoj, ne jam movigis la amasojn kontraŭ la registaro, kvankam ties politiko estas diktata ekskluzive de imperiistaj interesoj.

La centra problemo estas Francio, regata hodiaŭ de popolfronta registaro, sed ankoraŭ forte influata de la reakcio. En panika timo k kun prava abomeno antaŭ la milito, la franca etburĝaro k granda parto de socialistoj sin ligas absolute al la politiko de la registaro k insistas pri la «ne-interveno», kvankam per tio, la dangero pligrandiĝas pro la farita invito al la faŝistoj fanfarone profiti alies pacemon k pligrandigi siajn aspirojn. La reprezentantoj de la etburĝaro k kamparanaro, tute blindiĝintaj antaŭ la vera situacio, ne rifuzas partopreni en la «ideologia krozado», neniel vidante, ke tiu ĉi «krozado kontraŭ la komunismo», inventita de Hitler, havas tre realajn, materiajn objektojn. Ili do, nevole subtenas la ruzan taktikon de Hitler, preparante tiel la necesan spiritostaton de indiferento rilate al la vere aganta forto —la faŝismo—kiu puŝas la mondon al la plej sanga milito, kiun iam ajn konis la Historio.

Se la laboristaj elementoj de la popolfronto ne volas resti eterne la objekto de reakcia internacia politiko, kiu ĉiam direktas la landojn al armitaj konfliktoj; se ili volas, ke la paco estu «organizata» k defendata per institucioj ne influitaj de imperiismaj interesoj, se ili aspiras konfederacion de la nacioj, servanta al la definitiva malhelpo de militoj, tiam ili devas finfine k per tuta energio interveni, ne nur en la interna politiko de la respektivaj landoj, sed ili devas sekvi al «propra» internacia politiko, kiu jam estas antaŭskizita per la Ligo de Nacioj k per la ideo pri la kolektiva sekurigo, garantianta la pacon.

Tia politiko estas ebla dank' al la impetega imperiismo de la faŝistoj, kiuj endanĝerigas la ekziston de tutaj nacioj, kiujn oni do facile povas gajni por decida paca politiko. Ĝi endanĝerigas la ekziston de la tuta laborista movado, k sekve la tuta laborista klaso havas gravan intereson je tia politiko. Jam anticipe oni povas konsideri Sovetion kiel absolutan adepton de tia aranĝo, ĉar Sovetio, ne nur ne havas imperiismajn celojn, sed pli vere specialan intereson je daŭra paco.

La politiko de kolektiva sekuro, la organizo de la paco per universala alianco kontraŭ ĉiu atakanto, inplikas jam la batalon kontraŭ la faŝismo, implikas jam la moralan k «materian» subtenon al la hispana legitima Registaro. La laboristaro, ne aplikante sian tutan forton por puŝi siajn gvidantojn sur la vojon de la organizado de la paco, fosas sian propran tombon. Tial «estas la afero de ni ĉiuj, kiun defendas la heroaj batalantoj de Madrido» k al ni restas la tasko subteni ilin pli efike ol nur per esprimoj de sindona solidaro.

Joseph GERMAIN

**...on de abomena scienco por definitiva atako en universala amplekso**

**detrui rapide, sen stulta hezito, la minacon!**

# MOZAIKO

● En sektoro de Avila, Talavera, Toledo k Madrid, kies areo estas proksimume 10.000 km.kv. situas urboj k vilaĝoj kie ne restis eĉ unu enloĝanto. Ili forkuris pro teroro ĉar Franco kolerigita pro la fiasko de sia atako al Madrid ordonis kruelan detruigon. En vilaĝoj, apudaj al vojoj, la lukto estis pli grava; la enloĝantoj, freneziĝintaj, forkuris al lojala zono.

Post la faŝista masakro, en vilaĝoj Maqueda, Val de Sto. Domingo k aliaj ne restis eĉ unu familio; en aliaj, kiel Olalla, Torrijos, Móstoles, k. c. nur restis 15 aŭ 20 familioj malgraŭ tio ke ili enhavis antaŭe pli ol 2000 enloĝantojn. Gravega mizero regas tie; malaperis brutaro, arbaro, la kampoj restas senlaboraj...

● Laŭ brita gazeto «Daily Herald» en La Linea (apud Gibraltar), kies enloĝantoj nombris 80.000, nun restas nur 15.000. Ĉiutage estas pafmortigataj ĉirkaŭ 15 personoj pro la pasiva rezistemo al faŝistaj ordonoj. En Gibraltar la frumatenemaj angloj ĉiutage aŭdas la pafbruon de ekzekutadoj. Oni ekzekutis 17-jaran junulinon kiu estis graveda; ŝi estis akuzata enigi maldekstran ĵurnalon en la urbon, k ŝiaj lastaj vortoj estis: — «Mi ne scias kial oni mortigas min!»...

● Ĝis nun la italoj, kiuj batalis en la faŝista armeo estis vestitaj per hispanaj uniformoj, sed antaŭ tri semajnoj aperis en Madrida fronto kelkaj miloj da italoj vestitaj per nigra ĉemizo k ponardo. Kelkaj el ili estas kaptitaj en Boadilla.

● Apud vilaĝo Boadilla okazis batalo longedaŭra. Niaj trupoj kontraŭatakis tiel energie ke ili repuŝis la malamikon k prenis al ĝi ses tankojn. Ili estis tuj utiligataj kontraŭ siaj antaŭaj mastroj.

● Kiel ĉiuj aliaj hospitaloj, la Ruĝkruca hospitalo de Bujalance estis dum nokto bombardata de faŝistaj aeroplanoj, kiuj mortigis la vunditojn tie instalitajn.

Ĉiutage la faŝistoj senrezerve pruvas sian sovaĝecon.

● Germana militŝipo «Deutschland» apud portugala marbordo haltigis komercan anglan ŝipon «City of Oxford» k faris al ĝi provokemajn demandojn pri varoj, vojaĝo, ktp.

Jen nova pruvo pri tio ke germana eskadro estas je la servo de hispanaj faŝistoj.

● Laŭ angla gazeto «Daily Telegraph» generalo Franco petis al Hitler 60.000 soldatojn, kiujn li urĝe bezonas por gajni la militon.

Germana registaro sendas konstante trupojn. Oficiroj k soldatoj apartenantaj al 6ª Regimento de Tankoj de Neurippin jam eliris al Hispanio.

La germanaj aviadistoj estas petataj sendi sian korespondaĵon al Berlina poŝta oficejo W-10 k la soldatoj de tankoj k artilerio al C-2 k 22. Kelkaj patroj de soldatoj estas jam informitaj ke iliaj filoj estas grave vunditaj dum **manovroj.**

● En provinco Badajoz, kies ĉefurbo estas regata de l' faŝistoj, rezistas ankoraŭ kelkaj grupoj da laboristoj k dogangvardistoj, kiuj estas rifuĝitaj en montaro nomata Monsalud, cent kilometrojn malproksime de niaj linioj. La faŝistoj intencis kelkafoje venki ilin, sed ne sukcesis.



LUKTO DUM KRUDA VINTRO
En mezo de neĝo, kun frosta vento sed kun varma kuraĝo, la popolaj mitralistoj zorgas k dejoras atente...

Ili loĝas en kabanoj k sin nutras per la brutaro kiun ili forprenas al faŝistoj. Dum la noktoj ili ebligas la virinojn k infanojn veni en niajn vicojn.

● Laŭ Londonaj gazetoj, ses militŝipoj de la japana eskadro vojaĝas al Mediteranea maro.

Post la subskribo de japan-germana traktato, sendube ili venas helpi la germanojn en laboro de «ne interveno».

● Sensacia incidento okazis en itala urbo Milano, kie kvin cent soldatoj devis eliri en vojaĝo, laŭdire al Abisenio. Sed ili kredis, tute prave, ke oni transportas ilin en alian direkton k en stacidomo ili ĥore ekkriis: Al Hispanio nel al Hispanio nel... k ne eliris. Policistoj k faŝistaj milicanoj arestis multajn.

● En parolado dissendata per radio al la tuta mondo, la Papo parolis pri nuna monda situacio k kulpis la germanan paganismon pri malpaciĝo de la mondo. El liaj vortoj oni ja konjektas ke baskaj katolikoj pravas helpante legitiman hispanan registaron.

● La 27. Decembro la haveno Tarragona estis torpedata de submareno. La torpedoj celis al hispana ŝipo sed ne trafis ĝin, ili alvenis en la sablon, apud la haveno, k ne eksplodis. La torpedoj estas 6 ½ metroj longaj, el itala deveno k estas markitaj jene: unu, n.º 15290, A. V. I. T. 31, k la alia, n.º 15291 A. O. *Regulatore.* Jen alia pruvo pri la itala «ne interveno».

● Du toreadoroj, fame konataj, mortis sur batalkampo. «Algabeño» k «Torón».

La unua estis faŝisto, kiu de la unuaj tagoj sin dediĉis al murdado de laboristoj, liaj eksfratoj; la dua, Torón, ĉiam batalis apud siaj popolaj fratoj en defendo de demokratio kontraŭ internacia faŝismo. Li partoprenis la plej heroajn faktojn de la milito.

● Apud rivero Manzanares en Madrido, ĉio estas detruita. La malriĉaj dometoj de laboristoj malaperis; la novaj lernejdomoj, konstruitaj antaŭ kvar jaroj, estas ege difektitaj. La tombejoj San Sebastian k San Isidro estas tute detruitaj; el la maŭzoleo de iama diktatoro Primo de Rivera jam ne plu restas eĉ ŝtono. La kadavroj estas forĵetitaj de la eksplodoj en la surfacon, el kie ili povas konstati la detruigan laboron de siaj amikoj.

● Lau ĵus ricevitaj sciigoj, en La Coruña estas murditaj pli ol 2.500 laboristoj Lastatempe, por ŝpari municion, oni inventis frenezan metodon: oni enmetis en malnovan ŝipon 500 laboristojn el La Coruña k el Ferrol. Tiun ŝipon detruis meze de maro la militŝipo «C-2» konstruita por defendi la patrion, ne por ĝin detrui.

● Jam aperis nova traktato de Anglio k Italio kiu estas titolita «Gentlemen agreement».

Ĝi temas pri konservo de «statu quo» en Mediteranea maro; la saman tagon alvenis 6.000 italaj «volontuloj» en havenon Cádiz. Neniam oni vidis tiel rapidan k perfektan plenumon de traktato. Jen nova sukceso de faŝista sistemo.

# SAGETOJ SEN MALICO

● Ekde kiam la faŝistaj registaroj itala k germana agnoskis la bandestraron de Burgos, ŝprucis dubo en nia cerbo. Jen estas: kiam la germana k la itala popoloj agnoskos siajn registarojn?

● Sinsekvas la kunsidoj de la Komitato pri ne-interveno dum la «volontuloj» de la faŝistaj nacioj amase elŝipiĝas, kun taŭga armilaro grandskale sendita, en la hispanaj havenoj estrataj de la ribeluloj.

Ĉu sekreto? La fama komitato decidis ne interveni en la interveno.

● Se en Hispanio estus ribelintaj la maldekstruloj k la laboristoj, kontraŭ reakcia registaro, ne estus okazintaj deklaroj pri neŭtraleco, komitato pri ne-interveno k ĉio alia. La t. n. demokrataj Potencoj estus tuj interkonsentintaj pri la nekontestebla rajto de la legitima reĝistaro aĉeti, kie ajn, la necesajn militilojn por sufoki la «ruĝan» ribelon. Tiuokaze, la proletaro tutmonda akceptus tiun principon, eĉ simpatiante al la ribelintoj.

Sed la vero estas, ke ribelis la kapitalistaj tavoloj, la ekleziaj altranguloj, la armeestroj k la nobelaro kontraŭ laŭleĝa registaro etburĝa, subtenata de la proletoj. La dekadence demokrataj ŝtatoj senescepte malapogas nin, dum la internacia faŝismo elverŝas siaprofite korpusojn post korpusoj en nian landon. Sed la tutmonda proletaro rezignacie akceptas ĉi tiujn cirkonstancojn.

En Hispanio estas proverbo, kiu tekstas jene: «Kiam vi vidos, ke oni razas al via najbaro la barbon, sapumigu tuj la vian».

● Se ni ne dankus plenkore la helpon, kiun havigas al ni la internacia solidaro antifaŝista, ni ne estus sentemaj homoj. Ne nur la materia, sed eĉ la morala subteno kortuŝas nin k meritas dankon.

Unue, nutraĵon k vestojn; poste, kuracilojn, nun ambulancojn sendas frate al ni la eksterlanda simpatianaro. Ni ja eĉ petegas tiajn helprimedojn. Sed...

Ĉu ni ricevos finfine ĉerkojn k entombigistojn?

Eble la proletaro internacia, anstataŭ eluzi sian forton por influi sur la konduton de siaj registaroj, atendas funebre dediĉi al nia popolo, kun alta honoro, klaskonscian epitafon kolektivan!

● Iu brita amiko skribas al ni, ke li simpatias al nia afero, sed ne povas subteni nin, ĉar li estas ĝisoste «pacifisto» k sekve ne aprobas, ke iu ajn idealo estu perforte trudata. Kvazaŭ ni estus la ribelintoj!

La realaj faktoj povus iam krude disrevigi tiun k aliajn pacemulojn. Ili ja ne pretendos, ke ni agu tiel kristane, ke ni prezentu unu vangon, kiam oni ĵus ĵetas frapon sur la alian.

● Ĉu eta forgeso? Ni memorigas niajn francajn kamaradojn pri verko de iu Adolfo Hitler, kies titolo estas «Mein Kampf». Ni opinias, ke ĝis nun nia «kamarado» sinjoro Blum, ne havis tempon legi ĝin. La enhavo estas sensacie aktuala en Hispanio k ĝi povas esti ankaŭ tia, baldaŭ en Francio.

LA JUNULARO EN LA UNUA VICO

## La plej juna kapitano en la mondo

Felikso Carrero; li naskiĝis en Aranjuez, dum Februaro 1919. Li kreskis en mizero k laboro. Ankoraŭ en la infanaĝo, li jam fariĝis masonisto kiam estis 14-jara. Simpatiante al la Socialista Junularo, li aliĝis ĝin. Ankaŭ li membriĝis en la U. G. T.

Dum tri jaroj de sindikata vivo, li fariĝis konscia revoluciulo. Tuj post eksplodo de la faŝista ribelo, li alkuris la popolajn milicojn de Aranjuez. Li marŝis al la fronto. Tra la montarpintoj li bataladis en Julio k Aŭgusto. Oni elektis lin kaporalon. Pli poste, pro sia heroa konduto, li estis nomata leŭtenanto.

En Toledo, enmeze de terura pafado, li kuraĝis preni sur sin maljunulinon, kuŝanta pro krurvundo surstrate, k savis ŝin. La komandanto lin gratulis, sed li modeste rifuzis, argumentante, ke li simple plenumis devon.

Ĉe la Madrida batalfronto, 200 milicanoj posedis aron da somerdometoj en la fajrolinio. Subite, la malamikoj ekatakis k la kunbatalantoj de Felikso forlasis la postenon. «Kial vi kuras?» - li kriis. «Ni tuj rekaptu la dometojn!» laŭte li diris al la fuĝintoj. Nur dudek kamaradoj postsekvis lin, sed sufiĉis. Per manbomboj k fusilpafoj, ili rekonkeris la domojn. Pli grandnombra malamikaro, antaŭ la decida persisto de Carrero k de liaj kunuloj, forkuris dum la maŭroj falis, trafite de la kugloj de l' popolarmeanoj.

Ĉar la pozicio estis tre grava, denove la komandestraro gratulis lin k ĉi-foje, li atingis la titolon de kapitano. Li estas nun deksep-jaraĝa. «Kial vi eniĝis la milicojn?» — demandis lin ĵurnalisto. «Ĉar estis mia nepra devo» —li mallonge respondis. Kaj poste li aldonis: «Ĉar nia junularo volas vivi libere, tial ni devas por ĉiam forigi la faŝist-murdistojn. En tiu ĉi milito estas en disputo la rajto de la popolo vivi pli feliĉan vivon. Ni venkos!».

Antaŭ kelkaj tagoj, roto de la regimento «Kamparana Junularo» faris kunsidon. La politika komisaro sciigis: «Oni bezonas sepdek homojn el via taĉmento por la ŝtormbataliono de komandanto Toral. Vian roton komandos kapitano Carrero. Ĉu vi konsentas?».

Aklame ĉiuj jesis. Kaj nun Felikso Carrero, «la plej juna kapitano en la mondo» komandas trupon de ŝtormbataliono de la Popola Armeo, konsistigata de junuloj, kiuj konscias pri la signifo k celo de nia batalo.



PRUVO PRI BARBARECO
La valora Nacia Biblioteko en Madrido brulas pro la faŝistaj bomboj intence ĵetitaj tien.

AŬSKULTU RADIODISSENDOJN DE VALENCIO PRI HISPANA SITUACIO EN ESPERANTO!

Stacio de Komunista Partio—ondlongo 41,87 metroj— marde k vendrede je la 17ª horo (hispana tempo)

Stacio de C. N. T.-F. A. I.—ondlongo 42,40 metroj— lunde k vendrede je la 19ª horo (hispana tempo)

La socialista Stacio provizore ne funkcias

# KIEL LA RANOJ!

Ŝajne estas personoj, kiuj ankoraŭ ne komprenis la veran sencon de revolucio k pro tio ili ne kapablas opinii pri ĝi. Estas aluditaj tiuj, kiuj prijuĝas maltrafe la hispanan situacion.

La hispanaj popolanoj ne vane atendis longan tempon por konkeri dignan politikan sistemon. Sed tiu aspiro ne estis simple partia, ĝi estis vere ideala, ĝi devenas el profunda skuo de malsupruloj k subpremitoj. La mensogantaj diboĉaj bigotuloj, la perfidaj politikistoj, la malŝatataj kapitalistoj, la fieraj altranguloj aŭ stultaj nobeloj agis pli favore por la revolucio ol la noblaj predikoj k tre saĝaj konsiloj de modernaj verkistoj k fervoraj progresemuloj. La pluvego kovras per nenormala superfluo de akvo la landon, kaŭzante inundon, k la inundo detruas ĉion, ĝi detruas ankaŭ purige la putrajn marĉojn. Nur tio okazis en nia lando, tamen ekzistas kelkaj falsaj patriotoj, kiuj, kiel la ranoj, preferas putriĝi en la senpura marĉo de mizero k nesciado, kaŝitaj sub densa ŝlimo, ol rigardi la helan lumon de la suno.

## NIA MUNICIO

| | | |
|---|---|---|
| Valencia esperantistaro | 125 | ptoj. |
| V. P.—Callosa Ensarriá | 5 | » |
| O. J.—Trelleborg | 5 | svkr. |
| K. N.—Trelleborg | 5 | » |
| P. B.—Lisboa | 5 | ptoj. |
| J. G.—Arbaĵ | 5 | rub. |
| X. X.—Orihuela | 5 | ptoj. |
| Kdoj. el Fabregues | 20 | ffr. |
| Kdoj. el Levallois | 40 | » |
| Bernard.—Bonsbecqne | 22 | » |
| F. E. T.—Paris | 8 | » |
| Camin.—Mendon | 10 | » |
| J. P.—Rennes | 25 | » |
| L. V. Haarlem | 160 | » |
| J. S.—Paris | 20 | » |
| Haga gek-daro (dua sendo) | 45 | guld. |
| M. R.—Charbonnieres | 20 | » |
| L. V.—S. Sebastien | 80 | ffr. |
| F. P. F.—London | 50 | » |
| R. G.—S. Leonard | 50 | » |
| A. R.—Glasgow | 2 | ŝil. |
| A. D.—Bonsecours | 10 | ffr. |
| P. V. E.—Rotterdam | 150 | » |
| F. L. E.—Hilversum | 29 | » |
| O. H.—S. Denis | 10 | » |
| S. D. H.—Amsterdam | 10 | » |
| A. R.—Zeist | 30 | » |
| B. T.—Edinburgh | 2'11 | ŝil. |
| J. S.—Gateshead | 11'1 | » |
| C. F. M.—S. Albans | 52 | ffr. |
| D. M.—Charleroi | 50 | » |
| W. H. V. D.—Hilversum | 1 | guld. |
| A. N.—Alicante | 5 | ptoj. |
| F. C.—Sampedor | 2'50 | » |
| M. B.—Sampedor | 2'50 | » |

### AL NIAJ AMIKOJ EN HAGO

Ni sciigas, ke dum venonta Februaro ili ricevos, de nia tiea peranto, cirkuleron sur kiu estas ĉiuj petataj skribi sian nomon, adreson k la sumon, kiun ili deziras donaci kiel kontribuon por nia gazeto

LA ADMINISTRACIO

## VIA DEVO

ZORGI delikate havigi nian bultenon al viaj amikoj en faŝistaj landoj.

TRADUKI nacilingve la materialon k represigi ĝin en viaurba gazetaro.

SENDI nepre tuj al ni unu ekzempleron, almenaŭ, de la koncerna ĵurnalo.

STUDI atente niajn artikolojn k disvastigi ĉien k ĉiel la veron pri Hispanio.

SKRIBI al la redakcio leteron aŭ poŝtkarton pri mankoj, sugestoj aŭ planoj rilate nian aferon.

Ĉi tiu numero aperas denove kun du pliaj paĝoj. Fidelaj al nia promeso plibonigi la gazeton laŭ kresko de la praktika helpo, ni ĝojas sciigi niajn amikojn, ke ni zorgos jam konstante aperigi la gazeton samamplekse en la dua numero de ĉiu monato, se specialaj cirkonstancoj k malabundo de papero ne estas baro por nia deziro.

## Lasthora Impreso

En la sojlo de Madrido detruiĝas la ungoj k dentoj de la malamiko, malgraŭ la fakto, ke la faŝistaj vicoj ricevis kreskon per germanaj soldatoj.

Pirataj ŝipoj kanonpafas apudmarajn urbojn, sen alia intenco krom semi teruron inter la civila loĝantaro. Valencio ĵus ricevis la fajran bapton en sia haveno, kie faŝista ŝipo, en mallumo de nokto, ĵetis kelkajn obusojn kontraŭ militista hospitalo k privataj domoj kaŭzante la morton al dek personoj. Ĉe la duonjaro de nia lukto hardiĝas la kuraĝo k aperas la necesa disciplino por lerni tranĉi la kapon de tutmonda faŝismo.

## POPOLFRONTA LETERUJO

A. M. (F. E. T.)—París.—Ni bone notas la enhavon de via interesa letero. K-do. Mangada, malsana jam de antaŭ la milito, havas nun provizoran ripozon en nia urbo.

Batalfronto de Alcubierre (Huesca).—Ni petas sciigojn pri batalanto K-do. Jozefo Pané, 2-a. kolono P. O. U. M. ĉar franca kamarado pridemandas lin.

G. J. —Jönkoping. —Ni ricevis 10 respondk. *Salud!*

R. H.—Lille.—Ni dankas vian leteron k la donacon.

Aragona Batalfronto.—Al k-do. Navarro ni sendas nian dankon pro lia kora letero.

G.K.-Tabor. Viaj respondk. bone alvenis.

E. L. O.—London.—Viaj 5 ŝilingoj finfine trafis nin.

Van W.—Amsterdam.—K-doj. P. B. k T. M. bonfartas. K-doj. H. k K. P. batalas en fronto.

O. J.—Trelleborg.—Dankon al vi k al k-do. Nilsson pro via monsendo. Ni pristudas la aferon fiksi abonprezon. Intertempe ni kore akceptas subtenon ĉies, sed tutsame ni sendas la gazeton tute senpage al tiuj, kiuj ne povas helpi eĉ per monero (senlaboruloj, k. t. p.)

G. P. de B.—Enschede.—Ĝustatempe ni ricevis la respondkuponojn, kiujn vi aludas per letero 22.12.36.

G. I.—Cop.—Religio estas respektata en nia lando, sed ne la klerikalismo, kiu komercas per ĝi. La loĝantaro fervore subtenas k fortanime partoprenas la batalon kontraŭ la faŝismo. Aliajn demandojn ni ne povas respondi.

N. J.—Jönköping.—Ni enketas pri F. S. k eventuale ni sciigos vin. Pri R. L. ne eblas ĉar Zaragoza estas estrata de la ribeluloj.

Nekonata Samideano Usona.—Washington.—Ni bedaŭras ne povi sendi rekte al vi nian dankesprimon pro via anonima mondonaco.

W. T.—St. Helens, Lancs.—Pri via propono, turnu vin al k-do. O. Kuperman pri kies adreso k celoj vi povas legi en apuda sampaĝa avizo.

Lab. Esp. Asocio Nordamerika.—New York.—Ni petas kelkajn eldonistojn, sendi al vi ofertojn pri lernolibroj.

A. E.—Archangelsk.—Vian sinceran varman salutleteron ni dankas k profitos ĝin. Enmetitan leteron de knabino ni penos publikigi en gazeto «Pasionaria» k se ni sukcesas ni sendos al vi ekzempleron.

T. Ŝ.—Orĝonikidze.—Pardonu, ke ni forgesis siatempe mencii la ricevon de viaj telegramoj, tre ŝatataj de ni ĉiuj.

W. P.—San Antonio, Texas.—Via sendaĵo («*poco dinero*») ne trafis nin. Kiel k kiam vi ĝin sendis k al kiu?

J. D.—Ptuj. Via letero alvenis k al ties adreso (Esperanto - Grupo) ni sendas la gazeton ekde tiam.

K. V.—Valence d'Agen.—Ni antaŭdankas vian afablan proponon, kiun ni ne scias ĉu iu akceptos. Ankaŭ ni notas la nomon k adreson de la personoj povantaj informi pri la afero.

H. B.—Levallois.—K-doj. Barrufet k Sotero bonfartas k salutas vin. Rilate al k-do. Garcerán, nenion ni scias.

J. J.—Mora Noret.—Vian leteron ni legis kun ega intereso, aprobo k danko.

B. B.—Gomel.—Ni jam klopodas tiucele, laŭ viaj petoj.

F. J.—Anebej.—Estis miskompreno pri via monsendo de la 12.11.36., kiun ni finfine bonorde ricevis.

A. D.-Bonsecours.-Eble la ĉemetita bombeto eksplodis survoje ĉar ĝi ne trafis nin.

## AVIZO

Ni informas tiujn, kiuj demandas al ni kiamaniere ili povos veturi al Hispanio militcele, ke ili povas sin turni al

**K-DO. O. KUPPERMAN**

**Generalitat de Catalunya**

**COMISSARIAT DE PROPAGANDA**

**Avinguda 14 d' Abril, 462, bis, pral. BARCELONA**

Tiu kamarado, kiu organizas Esperantistan Kolonon, zorgos ankaŭ pri la deziroj de ne-esperantistoj kun simila celo.

Presejo de J. Olmos, Alicante, 33, Valencia